MOLIERE

LA MOKINDAJ PRECIOZULINOJ

KOMEDIO

El la franca lingvo tradukis

André RIBOT

INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO
HAGO, NEDERLANDO

MOLIERE

LA MOKINDAJ PRECIOZULINOJ

KOMEDIO

Originale aperis en 1659 sub la titolo:

LES PRECIEUSES RIDICULES

INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO
HAGO, NEDERLANDO

Ekzemplero n-ro 76

La vortojn netroveblajn en „Plena Vortaro” 4-a eldono vidu ĉe la librofino.

VIVO DE MOLIERE (Moljer)

Oni povas difini tri partojn en la vivo de Molière:

1. — LA JUNAĜO: *Jean Baptiste POQUELIN* (Poklen) naskiĝis en la jaro 1622, en Parizo, kie la patro laboris kiel drapiristo kaj ĉambristo de la reĝo; malgraŭ la patra deziro, ke la filo praktiku la saman metion, Jean-Baptiste ricevis tre ŝatindan instruon; li fariĝis unue lernanto de la fama Kolegio de *Clermont* (Klermon), en kiu li konatiĝis kun la idaro de la plej altrangaj eminentuloj: *Chapelle* (Ŝapel), *Bernier* (Bernje), Princo *De Conti* (Konti), k.t.p. Li aŭskultis la lekciojn de la epikura filozofo *Gassendi* kaj sub la gvidado de famaj profesoroj li lernis kiel legi kaj kompreni la latinajn verkistojn. Laŭŝajne, ĉio pretigis lin por la jura kariero, sed estiĝis en li nerezistebla inklino al teatra vivo, ĉar lia avo kunprenis lin ofte al la prezentadoj de la tiutempa teatro *„Hotel de Bourgogne"* (otel d burgonj).

2. — LA JAROJ DE PLIBONIĜO: En 1653 li forlasis la patran profesion kaj iĝis teatristo; sekvinte la instruon de la itala burleskulo *Scaramuccia* (skaramukĉia) li fondis, kun la familio *Béjart,* (beĵar) la „faman teatron", kies aktoroj sensukcese ludis en kelkaj parizaj teatroj. Post sensacia malsukceso en 1646, la trupo vojaĝis en la provincoj; oni scias, ke ĝi ludis en *Bordeaux* (bordo), *Toulouse* (tuluz), *Montauban* (montoban) k.t.p. En 1655 ĝi prezentis en *Lyon „L'Etourdi"* (eturdi — la Senpripensulo) kaj en 1656 *„Dépit amoureux"* (depi amurö — ĉagreno pro amo) en *Béziers* (bezie). La repertuaro de Molière enhavis laŭmodajn komediojn kaj tragediojn de *Corneille* (kornej), *Rotrou* (rotru) k.t.p. kaj multajn

farsojn inspiritajn de la italoj kaj de la popolaj tradicioj.

3. — LA JAROJ DE VERKADO: Post 12 jaroj da vojaĝado tra la francaj provincoj, Molière kun siaj geaktoroj revenis Parizon kaj akiris la reĝan favoron. La frato de la reĝo enoficigis lin kiel estron de lia trupo kaj disponigis al li la Ĉambregon de „*Petit Bourbon*" kaj poste „*Palais Royal*". Atinginte la gloron, Molière edziĝis al unu el siaj aktorinoj, *Armande Béjart* (1662) kaj sin dediĉis plene al sia laboro de trupestro, komedia kaj tragedia aktoro kaj aŭtoro, ĝis la tago, kiam li preskaŭ mortis sur la scenejo, ludante en la „Malsanulo pro imago" (1673).

Ĉar en tiu epoko la katolika eklezio ekskomunikis la teatristojn, lia vidvino devis peti de la reĝo mem la permeson por religia enterigo.

El tiu vivo ni precipe memoru, ke la reĝa protektado neniam mankis al Molière; sekve, li povis senpune ridindigi kelkajn etnobelojn kaj la religiajn hipokritulojn.

LIA VERKARO

1659 : La mokindaj preciozulinoj (Les précieuses ridicules.)
1661 : Lernejo por edzoj. — La teduloj. (L'Ecole des maris, les Fâcheux.)
1662 : Lernejo por edzinoj. (L'école des femmes.)
1663: Kritiko pri la lernejo por edzinoj. — Improvizaĵo de Versailles. (Critique de l'école des Femmes, L'impromptu de Versailles.)
1664 : Tartufo (3 aktoj). (Tartuffe.)
1665 : Don Juan.

1666 : La mizantropo. — La nevola kuracisto. (Le Misanthrope, Le Médecin malgré lui.)
1667 : Tartufo (5 aktoj). (Nepermesita ludado.)
1668 : Amfitriono. — La avarulo. — Georgo Dandin. (Amphytrion, L'avare, Georges Dandin.)
1669 : Tartufo (permesita ludado). — Sinjoro de Pourceaugnac.
1670 : La nobela burĝo. (Le bourgeois gentilhomme.)
1671 : Psikeo. — La ruzaĵoj de Skapino. (Psyché, Fourberies de Scapin.)
1672 : La kleraj virinoj. (Les femmes savantes.)
1673 : La malsanulo pro imago. (Le malade imaginaire.)

KIO ESTIS PRECIOZECO?

La monduman vivon, jam aranĝitan en Francujo sub la reĝadoj de Francisko I-a kaj Henriko II-a, interrompis la religiaj militoj, kaj dum la reĝado de Henriko IV-a, la vulgareco de la vivmanieroj atingis nivelon tiel altan, ke kelkaj influplenaj personoj decidis reagi; inter ili *Catherine de Vivonne, Markizino de Rambouillet* (Katrin d vivon, rambuje) retiriĝis en sian domegon *„Hotel de Rambouillet"* kaj tie aranĝis mondumajn kunvenojn, kiujn vizitadis regule la plej estimataj kleruloj de tiu epoko, precipe la spritega *Voiture* (vŭatür). La tiutempan preciozecon oni povas difini: klopodado kontraŭ vulgareco en ĉiaj formoj: vestaĵo, klereco, delikateco de la sentoj, de la spirito kaj de la lingvo.

Tia celo estis do laŭdinda, sed, bedaŭrinde, la reago fariĝis troa, kiel la malbonaĵo mem, kiun ĝi intencis kontraŭbatali; ridindigi tiun troigon estas la celo de Molière en „LA MOKINDAJ PRECIOZULINOJ".

MOLIERE

LA MOKINDAJ PRECIOZULINOJ

TABELO DE LA ROLULOJ

LA GRANGE *(la granĵ)*	malakceptita amindumanto
DU CROISY *(dü krŭazi)*	malakceptita amindumanto
GORGIBUS *(gorĵibüs)*	burĝo
MAGDELON *(magd-lon)*	filino de Gorgibus — mokinda preciozulino
CATHOS *(katos)*	nevino de Gorgibus — mokinda preciozulino
MAROTTE *(marot)*	servistino de la preciozulinoj
ALMANZOR *(almanzor)*	lakeo
Markizo de MASCARILLE *(maskarij)*	servisto de La Grange
Vicgrafo de JODELET *(ĵod-le)*	servisto de Du Croisy
Du seĝportistoj	
Najbarinoj	
Violonistoj	

Loko de agado: Parizo, domo de Gorgibus.

SCENO I

Du Croisy — Via moŝto La Grange....

La Grange — Kion?

Du Croisy — Rigardu min do, neridante.

La Grange — Nu?

Du Croisy — Kion vi opinias pri nia vizito? Ĉu tute kontenta pri ĝi?

La Grange — Ĉu laŭ via opinio ni ambaŭ havas motivon de kontenteco?

Du Croisy — Ne tute, verdire.

La Grange — Miaopinie — mi malkaŝas al vi — ke mi estas tute indignigita. Diru, ĉu oni vidis iam antaŭe du provincajn stultulinaĉojn kondutantajn pli malestime ol tiuj, kaj du virojn traktitajn pli malŝate ol ni? Apenaŭ ili konsentis, ke oni portu al ni seĝojn. Neniam mi vidis iun paroli tiel ofte ĉeorele kiel ili faris, kaj oscedi kaj froti la okulojn kaj demandi tiel ofte: „Kioma horo estas?" Ĉu ili respondis ion alian ol „jes" kaj „ne" pri ĉio, kion ni diris al ili? Kaj fine, ĉu vi konfesos, ke eĉ se ni estus la plej lastrangaj homoj, oni povis akcepti nin pli malĝentile ol ili faris?

Du Croisy — Ŝajnas al mi, ke vi tutkore koleras pro tio.

La Grange — Kompreneble, mi koleras, kaj tiel multe, ke mi volas venĝi tiun malĝentilaĵon. Mi scias, kial ili malŝatas nin. La aero de preciozeco infektis ne nur Parizon, ĝi disvastiĝis ankaŭ en la provincojn kaj tiuj niaj mokindaj fifraŭlinoj enspiris bonan kvanton da ĝi. Unuvorte, ili estas miksaĵo de preciozulino kaj de koketulino. Mi komprenas, kio necesas

por ĝui indan akcepton, kaj se vi fidas min, ni ambaŭ trompos ilin laŭ maniero, kiu montros al ili ilian stultecon kaj ebligos iom pli ĝustan estimon de la konatuloj.

Du Croisy — Kiamaniere?

La Grange — Mi havas iun lakeon, nomitan Mascarille, kiun kelkaj personoj konsideras kiel kvazaŭan spritulon; nuntempe ja nenio estas pli facile trovebla ol nobla spriteco. Li estas ekstravaganculo, kiu encerbigis al si, konduti kiel altrangulo. Ĝenerale li arogantas pri monduma ĝentileco kaj pri versoj kaj malestimas la aliajn lakeojn tiagrade, ke li nomas ilin brutoj.

Du Croisy — Nu, kio estas via intenco pri li?

La Grange — Kion mi intencas fari? Necesas.... sed antaŭe ni eliru de ĉi tie.

SCENO II

Gorgibus — Nu, vi ĵus vizitis la nevinon kaj la filinon: ĉu vi eliras esperplenaj? Kio rezultis el via vizito?

La Grange — Tio estas afero, kiun vi ekscios pli bone de ili ol de ni. Ni povas diri nur, ke ni estas tre dankaj al vi pro la favoro via kaj ni restas viaj tre humilaj servontoj.

Gorgibus (sola) — J-jes! Ŝajne, ili eliras nekontentaj. Kia kaŭzo naskis ilian malkontentiĝon? Mi devas informiĝi, kio okazis. Hola!

SCENO III

Marotte — Kion vi deziras, sinjoro?
Gorgibus — Kie estas viaj mastrinoj?
Marotte — En sia persona ĉambreto.

Gorgibus — Kion ili faras?

Marotte — Lippomadon.

Gorgibus — Ili tro pomadumas. Venigu ilin malsupren. *(sola)* Tiuj bubinaĉoj, per siaj pomadoj, sendube intencas ruinigi min. En ĉiuj lokoj mi trovas nur ovblankaĵojn, virgan lakton[1]) kaj mil aliajn vantaĵojn kiujn mi ne konas. De kiam ni loĝas ĉi tie, ili uzis la lardon de almenaŭ duona dekduo da porkoj! Kaj kvar lakeoj sin povus nutri ĉiutage per la ŝafpiedoj[2]), kiujn ili uzas.

SCENO IV

Gorgibus — Estas ja necese, verdire, elspezi tiel multe por ŝmiri vian muzelon. Diru al mi, kiel vi kondutis kontraŭ tiuj sinjoroj, kiujn mi ĵus vidis eliri malkontente? Ĉu mi ne ordonis, ke vi akceptu ilin kiel personojn, kiujn mi intencas doni al vi kiel edzojn?

Magdelon — Kaj kiel povus ni, patro mia, estimi la neregulajn procedojn de tiuj fiuloj?

Cathos — Kiel eblas, onklo mia, ke iom saĝa junulino povu kontentiĝi je iliaj personoj?

Gorgibus — Kion do vi trovas kritikebla en ili?

Magdelon — Kiel bele ili amindumas! Kio? Ili komencis per edziĝa afero.

Gorgibus — Per kiu vojo ili do komencu, laŭ via ideo? Ĉu tio ne estas procedo, pri kiu vi devas kontenti, tiel bone kiel mi? Ĉu ekzistus io pli honoriga ol tio?

[1]) Virgan lakton: tiun ŝmiraĵon uzis la virinoj por blankigi la manojn kaj la vizaĝon.

[2]) Ŝafpiedoj: Laŭ la asertoj de samtempuloj de Molière, lardo kaj ŝafpiedoj utilis por la preparado de multaj konserviloj por la beleco de la virinoj.

Kaj tiu sankta ligilo, je kiu ili sopiras, ĉu ĝi ne atestas la honestecon de iliaj intencoj?

Magdelon — Ha! patro mia, tiuj viaj paroloj odoras kiel la lastranga burĝaĵo. Vi hontigas min, kiam mi aŭdas vin tiel paroli kaj vi devus ja instruigi al vi la monduman muzikon de la vivo.[3])

Gorgibus — Nek muzikon, nek kanzonojn mi bezonas. Mi diras al vi, ke la edziĝo estas sanktaĵo kaj ke komenci per tio estas agi honeste.

Magdelon — Dio mia, kiel rapide romano finiĝus, se ĉiuj similus je vi! Kiel bele, se, senprepare, Kiruso edziĝus al Mandano kaj se Aronso glate edziĝus al Klelio!

Gorgibus — Kion rakontaĉas al mi tiu ĉi?

Magdelon — Patro, jen mia kuzino diros al vi tiel bone kiel mi, ke la edziĝon oni devas priparoli nur post la aliaj aventuroj. Por impresi agrable, amanto devas scipovi la eldiradon de la belaj sentoj, esprimi sin milde, ameme kaj pasie kaj svati laŭregule. Unue, li devas vidi en la templo, aŭ sur la promenejo, aŭ okaze de ia ajn publika ceremonio, la personon, al kiu li enamiĝis; aŭ necesas, ke iu parenco aŭ amiko konduku lin al ŝia domo, kaj de tie li eliru reveme kaj melankolie. Dum kelkaj tagoj li kaŝas sian pasion al la amatino, kaj tamen vizitas ŝin plurfoje; tiuokaze, oni nepre diskutas pri amindumaĵoj, kiuj ekzercas la spiritojn de la kunvenintoj. Finfine, alvenas la tago de la amdeklaro, kiu laŭkutime okazas en iu aleo de ĝardeno, dum la kunestantoj staras iom for; kaj tiun esprimon sekvas rapidmova kolero, kiu montriĝas per nia ruĝiĝo kaj kiu dum kelka tempo fortenas la amanton. Poste li sukcesas

[3]) Tiu esprimo en tiu epoko estis kreaĵo de la preciozulinoj kaj estis ridinda.

nin senkolerigi kaj neperceptebleble alkutimigi al la pasiaj vortoj kaj eltiri el ni tiun konsentvorton, kiu tiel multe nin suferigas. Poste alvenas la oportuna tempo por la aventuroj: la rivaloj, kiuj sin ĵetas kontraŭ jam decidita inklino, la persekutoj de la patroj, la ĵaluzoj estigitaj de trompaj ŝajnigoj, la plendoj, la senesperiĝoj, la forraboj kaj tiel plu. Jen kiel okazas la afero en la delikataj vivmanieroj de tiu ĉi jarcento kaj ili estas reguloj, de kiuj nepre ne decas flankeniĝi. Sed unue priparoli la edziĝon, amindumi nur dum la preparo de la edziĝkontrakto kaj komenci la romanon ĉe la fino, — ankoraŭfoje patro, nenio estas pli negocosimila ol tia konduto; kaj eĉ la nura vido korpremas min.

Gorgibus — Kian diablan ĵargonon mi tie ĉi aŭdas? Jen estas ja bela parolarto!

Cathos — Efektive, onklo, mia kuzino vere komprenas la aferon. Kiel eblas akcepti personojn tute neinstruitajn pri galanteco? Mi volas veti, ke ili neniam vidis la mapon de Amujo[4]) kaj ke Ambiletujo, Afablujo kaj Belversujo estas de ili nekonataj landoj. Ĉu vi ne rimarkis, ke ilia tuta persono indikas tion kaj ke ili ne posedas tiun aspekton, kiu tuj naskas favoran impreson pri la vizitantoj? Amcele viziti iun kun senornamaj kruroj, senpluma ĉapelo, neregule kombita kapo kaj vesto malriĉa je rubandoj....! Dio mia, kiaj amantoj ili estas! Kia sobreco pri vestaranĝo kaj kia parola senspriteco! Tion ĉi toleri ja neeblas. Mi rimarkis plie, ke iliajn pendkolumojn[5]) ne faris reputacia faristino kaj ke iliaj kulotoj estas

[4]) La mapo de la lando Amujo troviĝas en la unua parto de la romano de Klelio. Ambiletujo, Afablujo kaj Belversujo estas etaj vilaĝoj transirotaj de la amanto respektema al la ceremonieco pri amaferoj.

[5]) Pendkolumoj: delikata tolpeco, kelkfoje ornamita per puntoj, pendanta sub la kolumo de la vesto.

tro mallarĝaj almenaŭ duonan futon!

Gorgibus — Mi opinias, ke ili ambaŭ freneziĝis, kaj neniom mi komprenas el tiu ĉi lingvaĉo. Cathos kaj vi Magdelon....

Magdelon — He! mi vin petegas, patro mia, ĉesu voki nin per tiuj strangsonaj nomoj kaj nomu nin alimaniere.

Gorgibus — Kion vi diras? Strangsonaj nomoj? Ĉu ne viaj baptonomoj?

Magdelon — Dio mia! Kiel vulgara vi estas! Ĉu, en la bela stilo, oni iam parolis pri Cathos kaj Magdelon, kaj ĉu vi ne konfesos, ke unu el tiuj finomoj sufiĉas por mallaŭdigi la plej belan romanon en la mondo?

Cathos — Verdire, onklo, iom delikata orelo furioze[6]) suferas ĉe la aŭdado de tiaj nomoj; kaj la nomo Polikseno, elektita de mia kuzino, kaj Aminto, kiun mi al mi mem donis, enhavas gracion, pri kiu vi sendube samopinios.[7])

Gorgibus — Aŭskultu, nur unu vorto utilas: mi ne konsentas, ke vi havu nomojn aliajn ol tiujn, donitajn de viaj baptogepatroj; kaj koncerne tiujn pridiskutitajn sinjorojn: mi konas iliajn familiojn kaj bienojn, kaj mi plendecide postulas, ke vi pretiĝu akcepti ilin kiel edzojn. Mi laciĝas, vivteni vin, kaj la zorgado pri du junulinoj estas tro peniga laboro por viro, kiu aĝas kiel mi.

Cathos — Mi, onklo, povas diri nur, ke mi juĝas geedziĝon tute ŝoka afero. Kiel do oni povas elteni la penson kuŝi kontraŭ tute nuda viro?

[6]) Terurege, furioze, diable, estas adverboj, kiujn uzis tre ofte la precioza parolstilo de la XVII-a jarcento.

[7]) La preciozulinoj kutimis ŝanĝi siajn baptonomojn kaj doni al si romanajn nomojn.

Magdelon — Toleru, ke ni iom ekspiru inter la monduma spritularo de Parizo, kien ni ĵus alvenis. Lasu nin fari laŭ nia plaĉo la intrigon de nia romano kaj ne rapidigu tiel arde ĝian konkludon.

Gorgibus (aparte) — Vi ne dubu pri tio; ili plene freneziĝis. *(laŭte)* Ankoraŭfoje, mi nenion komprenas pri tiuj ridindaĵoj; mi volas esti absoluta mastro; kaj por fini ĉiajn paroladojn: aŭ vi edziniĝos post nelonge, aŭ vi fariĝos monaĥinoj; mi senkondiĉe tion ĵuras.

SCENO V

Cathos — Dio mia! karulino, kiel profunde via patro enhavas sian menson en la materio! Kiel plumpa lia inteligento kaj kiel malluma lia animo!

Magdelon — Kion mi povas fari, kara? Mi konfuziĝas pro li. Malfacilas al mi kredi, ke mi vere estas lia filino; kaj mi opinias, ke iu aventuro, iam, montros al mi altrangan devenon.

Cathos — Mi volonte samopinias; jes, nepre ŝajnas tiel; kaj, kiam mi konsideras ankaŭ min....

SCENO VI

Marotte — Jen estas lakeo, kiu demandas, ĉu vi estas hejme. Li diras, ke lia mastro volas viziti vin.

Magdelon — Lernu, stultulino, esprimi vin malpli vulgare. Diru: „Jen staras ulo, kiu demandas, ĉu vi troviĝas en oportuneco por esti videblaj".

Marotte — Pardonu! Mi ne komprenas la latinan lingvon kaj ne lernis, kiel vi, filofion [8]) en la Granda Kiro.

[8]) En la lingvaĉo de la servistino „filofio" signifas la „filozofion". La „Granda Kiro" estas romano de F-ino de Scudéry (sküderi).

Magdelon — Malĝentilulino! Kiamaniere toleri tion? Kaj kiel nomiĝas la mastro de tiu lakeo?

Marotte — Li nomis lin Markizo de Mascarille.

Magdelon — Ha! Kara! Markizo! Jes, tuj diru, ke ni povas akcepti lin. Sendube, li estas spritulo, kiu pri ni aŭdis.

Cathos — Certe, kara.

Magdelon — Ni devas akcepti lin en la kabineto, prefere ol en nia ĉambro. Ni ordigu iom niajn harojn kaj prizorgu nian aspekton. Rapide, venu ĉi tien teni la konsilanton pri gracio.[9])

Marotte — Je Dio, mi ne scias, kiu besto estas tio: parolu kristane[10]), se vi volas, ke mi komprenu vin.

Cathos — Alportu al ni la spegulon, vi, malklera, kaj gardu vin, ke vi ne malpurigu ĝin per la respeguligo de via bildo. *(Ili eliras.)*

SCENO VII

Mascarille — Halt'! Portistoj, halt'! Tie, tie, tie, tie, tie, tie. Mi pensas, ke tiuj friponoj intencas min dispecigi per multa frapado kontraŭ la muroj kaj la pavimo.

Unua portisto — Pardonu! Sed la pordo estas mallarĝa; vi volis ke ni eniru ĝis tie ĉi.

Mascarille — Certe, mi postulis. Ĉu vi volus, mizeruloj, ke mi prezentu la majestecon de miaj plumoj al la malboneco de la pluva vetero kaj ke mi enkotigu miajn ŝuojn? Iru, forprenu vian portseĝon.

Dua portisto — Bonvolu pagi nin, sinjoro, ni petas.

[9]) „Konsilanto pri gracio" precioza termino por „spegulo".
[10]) „Paroli kristane" t.e. kiel kristano parolas, laŭ komprenebla maniero.

Mascarille — Hm?

Dua portisto — Mi petas, sinjoro, ke vi donu al ni monon.

Mascarille (donante al li vangfrapon) — Ĉu vere, peti monon de tia altrangulo, kia mi!

Dua portisto — Ĉu tiamaniere oni pagas la malriĉulojn? Kaj ĉu via altrangeco provizas nin per manĝaĵoj?

Mascarille — Ha! Ha! Mi zorgos, ke vi konu min! Tiuj kanajloj kuraĝas moki min.

Unua portisto (prenante bastonon el la seĝo) — Pagu nin tuj!

Mascarille — Kio?

Unua portisto — Mi diras, ke ni volas ricevi monon senprokraste.

Mascarille — Estas ĝuste.

Unua portisto — Sekve, rapide.

Mascarille — Jes, vi parolas dece; sed la alia estas sentaŭgulo, kiu malprave babilas. Prenu, ĉu kontenta?

Unua portisto — Ne, mi ne estas kontenta; vi frapis mian kunulon survange kaj *(levante sian bastonon)*....

Mascarille (senbrue) — Prenu, jen pro la frapo. Oni ĉiam sukcesas, kiam oni petas min belmaniere. Nu, revenu por porti min al la Luvro, por la reĝa enlitiĝo.[11])

SCENO VIII

Marotte — Sinjoro, miaj mastrinoj tuj alvenos.

[11]) „Luvro", palaco, kie loĝis la franca reĝo.

Mascarille — Ili ne rapidu, mi petas; ĉi tie mi sidas komforte por atendi.

Marotte — Jen ili.

SCENO IX

Mascarille (salutinte) — Sinjorinoj, vin sendube surprizos mia aŭdaca vizito; sed via reputacio naskas al vi tiun malbonan aferon, kaj la merito enhavas por mi tiel potencajn ĉarmojn, ke mi al ĉiuj lokoj ĝin postkuras.

Magdelon — Se vi postkuras la meriton, vi devis kunporti ĝin.

Cathos — Por, en nia domo, vidi meriton, vi devis ja kunporti ĝin.

Mascarille — Ha! Mi solene protestas kontraŭ tiuj paroloj viaj. La famo prave diskonigas vian valoron, kaj vi tie ĉi kolektos ĉiujn parizajn elegantulojn.

Magdelon — Via ĝentila komplezemo iom troigas la liberalecon de laŭdoj viaj; kaj mia kuzino kaj mi nin gardas, ke ni fidu la dolĉecon de via flatemo.

Cathos — Karulino, ni donigu seĝojn.

Magdelon — Hola! Almanzor!

Almanzor — Sinjorino?

Magdelon — Rapide, alveturigu al ni la oportunaĵojn por la konversacio.[12])

Mascarille — Sed, almenaŭ ĉu ĉi tie estas por mi sendanĝere? *(Almanzor eliras.)*

Cathos — Kion vi timas?

Mascarille — Iun forrabon de mia koro, iun murdon de

[12]) Precioza parafrazo por „brakseĝo".

mia malkaŝemo. Mi vidas tie ĉi okulojn, kiuj impresas kiel friponoj, kiuj ŝajnas surprize ataki la liberecojn kaj trakti la animojn kiel turkoj maŭrojn.[13]) Diable! Tuj kiam oni alproksimiĝas, ili pretiĝas defende. Ha! mi ja malfidas ilin, kaj mi tuj foriros aŭ mi deziras burĝan garantion, ke ili min ne atakos.

Magdelon — Mia kara, li estas milde gajema.

Cathos — Mi ja ekkomprenas, ke li estas Amilkar.[14])

Magdelon — Ne timu, niaj okuloj ne estas malbonintencaj kaj dormi povas via koro, trankvile fidante al ilia honesto.

Cathos — Sed, mi petas, sinjoro, ne estu malkonsentema al tiu seĝo, kiu siajn brakojn etendas al vi, ekde kvarono da horo; kontentigu do ĝian sopiron por ĉirkaŭpreni vin.

Mascarille (kombinte kaj ordiginte siajn harkirlaĵojn) — Nu, sinjorinoj, kion vi opinias pri Parizo?

Magdelon — Ve! Kion ni povus diri? Nur la antipodo de la saĝo ne konfesos, ke Parizo estas la sola loko por ĉiuj mirindaĵoj, la centro de bongusto, sprito kaj delikateco.

Mascarille — Miaopinie, ekster Parizo nenia savo por la kleruloj.

Cathos — Nedubeble vera estas tio.

Mascarille — Estas, verdire, iom da koto, sed ni havas la portseĝon.

Magdelon — Vere, ke la seĝo estas admirinda ŝirmilo kontraŭ la insultoj de l' koto kaj de l' malbona vetero.

[13]) Kiel la turkoj traktis la maŭrojn, t.e. senkompate.

[14]) Amilkar' estas rolulo de Klelio.

Mascarille — Vi ricevas multajn vizitojn; kiu nobla spritulo vin vizitas?

Magdelon — Ve! Oni nin ankoraŭ ne konas; sed ni baldaŭ estos famaj kaj intima amikino nia promesis, ke ŝi kondukos ĉi tien ĉiujn sinjorojn de la „Kolekto de Elektitaj Poezioj".[15])

Cathos — Kaj plie kelkajn al ni menciitajn, ĉar ili estas suverenaj arbitraciantoj de ĉio bela.

Mascarille — Neniu pli bone ol mi povas utili al vi; ili ĉiuj vizitas min kaj mi neniam ellitiĝas[16]) sen duona dekduo da noblaj sprituloj.

Magdelon — Nu, Dio mia, ni dankegos plej multe al vi se vi faros al ni tiun amikaĵon; ĉar, oni devas interrilatiĝi kun ĉiuj ĉi sinjoroj, se oni volas partopreni en la eleganta mondo. Ili estigas famon en Parizo, kaj mi scias, ke estas kelkaj, kies nura frekventado sufiĉas por famigi iun kompetenta, eĉ se estus nenio alia. Sed, miaopinie, tio, kion mi plej ŝatas, estas, ke, per tiuj spritulaj vizitoj, oni ekscias mil aferojn sciindajn kaj kiuj estas esenco de nobla spriteco. Tiel oni ekkonas ĉiutage la etajn galantajn novaĵojn, la beletajn interŝanĝojn prozajn kaj versajn. Ĝustatempe oni scias: „Tiu verkis la plej belan teatraĵon en la mondo pri tia temo; ĉi tiu elpensis parolojn por tia ario; tiu faris madrigalon pri ĝojaĵo; tiu verkis stancojn pri nefidelaĵo; Sinjoro Tielnomita hieraŭvespere, skribis sesversaĵon al Fraŭlino Tia kaj Tia, sekve de kio, ŝi sendis respondon hodiaŭ matene, je la oka; tiu aŭtoro prilaboras la trian parton de sia romano; tiu alia presigas siajn ver-

[15]) „Kolekto de Elektitaj Poezioj": la aŭtoroj kutimis legi siajn novajn verkojn antaŭ la ĉefaj beletruloj de tiu epoko.

[16]) En tiu tempo estis kutimo, ke kelkaj korteganoj ĉeestis la en- kaj la ellitiĝon de la reĝo; ĉi tie, por ridinda efekto, Mascarille sin levas ĝis la reĝa nivelo.

kojn". Tio valorigas vin inter la elegantuloj kaj se oni tiujn detalojn ne scias, mi ne donus eĉ soldon por la tuta sprito eble posedata.

Cathos — Efektive, mi opinias plej ridinde, ke iu persono fanfaronas pri spriteco kaj ne scias eĉ la plej mallongan kvarversaĵon ĉiutage verkitan; kaj mi terurege hontus, se oni demandus min ĉu mi legis ion de mi nekonitan.

Mascarille — Tute vere! Estas hontige ne ekscii, inter la unuaj, kion oni verkas; sed, ne ĉagreniĝu; mi intencas starigi en via domo Akademion el belspritulo j kaj mi promesas al vi, ke ne ekestos peco de versaĵo en Parizo, kiun vi ne konos parkere antaŭ ĉiuj aliaj. Mi, kiun vi vidas, amuziĝas iom pri tio, laŭ mia gusto, kaj tra la parizaj salonoj, vi aŭdos, el mia faro, ducent kantetojn, tiom da sonetoj, kvarcent epigramojn kaj pli ol mil madrigalojn, nekalkulante enigmojn kaj rimportretojn.[17])

Magdelon — Mi konfesas, ke mi pasie ŝategas la portretojn; mi konceptas nenion pli galantan ol tio.

Mascarille — La portretoj estas nefacilaj kaj postulas profundan spiriton; vi aŭdos kelkajn el la miaj, kiuj plaĉos al vi.

Cathos — Mi terure ŝatas la enigmojn.

Mascarille — Tio ekzercigas la spiriton, kaj hodiaŭ matene mi verkis kvar, kies divenadon mi proponos al vi.

Magdelon — La madrigaloj, kiam akre verkitaj, estas agrablaj.

Mascarille — Tie kuŝas mia propra talento, kaj mi

[17]) Tiel granda nombro da verkaĵoj devus estigi malfidon en Cathos kaj Magdelon, sed Molière volis reliefigi ilian stultecon.

laboras aranĝante la tutan Roman Historion en madrigalojn.[18])

Magdelon — Ha! Certe, tio estas plej bela. Mi antaŭmendas almenaŭ unu ekzempleron, se vi presigos ĝin.

Mascarille — Mi promesas unu al ĉiu el vi, kaj el la plej lukse binditaj. Tio estas trans miaj monrimedoj, sed mi faras tion nur por gajnigi la librovendistojn, kiuj turmentas min.

Magdelon — Mi imagas, kiel granda estas la plezuro vidi siajn verkojn presitaj.

Mascarille — Sendube. Sed ĉar temas pri tio, mi devas diri al vi improvizaĵon, kiun mi verkis hieraŭ ĉe iu dukino, amikino mia, kiun mi vizitis; ĉar mi estas diable kompetenta pri la improvizaĵoj.

Cathos — La improvizaĵo estas, ja, provilo por la spirito.

Mascarille — Aŭskultu do.

Magdelon — Ni atentas per niaj oreloj tutaj.

Mascarille:

„Ho, ho! Mi ne atentadis;
Dum, sen intenco misa, mi vin rigardas,
Via okulo kaŝete la koron rabas
Ŝteliston, ŝteliston, ŝteliston, ŝteliston."

Cathos — Ha! Dio mia! Kiel ĝentile esprimite!

Mascarille — Ĉiuj miaj verkoj aspektas kavalire; ne odoras pedante.

Magdelon — Tio estas pli ol du mil mejlojn for de pedanteco.

Mascarille — Ĉu vi rimarkis tiun komencon: Ho, ho?

[18]) Denove, ridinda aserto.

Jen estas io eksterkomuna: ho, ho! Kiel viro kiu subite ekvidas: ho, ho! Surprizon: Ho, ho!

Magdelon — Jes, mi trovas tiun „Ho, ho!" admirindega.

Mascarille — Ŝajnas, ke tio estas nenio.

Cathos — Dio mia! Kion vi diras? Tiajn bonaĵojn ja oni povas pagi.

Magdelon — Nedubinde; kaj mi pli ŝatus esti verkinta tiun Ho, Ho! ol epopeon.

Mascarille — Per Dio! bonega estas via gusto.

Magdelon — He! Ne tute malbona.

Mascarille — Sed, ĉu vi ne admiras ankaŭ tiun „Mi ne atentadis"? Mi ne atentadis, mi ne rimarkadis tion; ordinara esprimo: mi ne atentadis. Dum, sen intenco misa, dum, naivege, senmalice, kiel bonanima ŝafo, mi vin rigardas, tio estas: mi amuze konsideras vin, mi observas vin, mi admire rigardas vin; via okulo, kaŝete.... Kiel aspektas al vi tiu vorto „kaŝete"? Ĉu ne perfekte elektita?

Cathos — Tute plej bone!

Mascarille — Kaŝete, ŝtele; ŝajnas, kvazaŭ kato ĵus ekkaptus muson, kaŝete.

Magdelon — Nenio pli belega povas esti.

Mascarille — „La koron rabas", forprenas, forrabas. Ŝteliston, ŝteliston, ŝteliston, ŝteliston! Ĉu vi ne pensas pri viro kuranta kaj krianta post ŝtelisto, por arestigi lin? Ŝteliston, ŝteliston, ŝteliston!

Magdelon — Konfesende, ke tio ĉi aspektas sprita kaj galanta.

Mascarille — Mi volas kanti la arion, kiun mi komponis pri tiu versaĵo.

Cathos — Ĉu vi lernis muzikon?

Mascarille — Mi? Tute ne.

Cathos — Nu, kiel povas esti?

Mascarille — La kleruloj scias ĉion, sen antaŭa lernado.

Magdelon — Certe ja, kara.

Mascarille — Aŭskultu, ĉu vi ŝatas la arion. Hm, hm, la, la, la, la, la, la malmildeco de la vetero furioze difektis la delikatecon de mia voĉo, sed ne gravas, improvize *(li kantas)*

Ho! Ho! Mi ne atentadis..

Cathos — Ha! Kiel plenpasia tiu ario! Ĉu oni ne mortas pro ĝi?

Magdelon — Estas kromatajo en tio.[19])

Mascarille — Ĉu vi ne opinias, ke la kanto bone esprimas la penson? ..Ŝteliston!.. kaj poste, kvazaŭ laŭtege, ŝteli, i, i, i, i, i, iston! ŝteliston! Kaj subite, same kiel senspira persono: ŝteliston.

Magdelon — Tio estas koni la subtilon de la aferoj, la grandan subtilon, la subtilon de la subtilo. Ĉio estas belega, mi certigas; min entuziasmigas la ario kaj la paroloj.

Cathos — Antaŭe mi nenion vidis tiel potencan.

Mascarille — Ĉio, kion mi verkas, naskiĝas nature, sen lernado.

Magdelon — La naturo montriĝis al vi vera patrino kaj vi estas ĝia dorlotata ido.

Mascarille — Kiel vi do pasigas la tempon?

[19]) Kromatajo: muzika termino, kiun Magdelon uzas, verŝajne, ne komprenante ĝian signifon.

Cathos — Ni faras nenion.

Magdelon — Ĝis nun, ni terure fastis pri distroj.

Mascarille — Mi proponas baldaŭ konduki vin al la komediejo, se vi ŝatas; novaĵo estos ludata baldaŭ kaj mi plezurus, se ni vidus ĝin kune.

Magdelon — Tio ne estas rifuzinda.

Mascarille — Sed mi petas vin, aplaŭdi taŭge, kiam ni ĉeestos ĝin; ĉar mi promesis publike aprobi la teatraĵon kaj la aŭtoro denove hodiaŭ vizitis min tiucele. Tie ĉi estas kutimo, ke al ni, altranguloj, la aŭtoroj legas siajn novajn teatraĵojn, por instigi, ke ni trovu ilin belaj kaj famigu ilin, kaj mi rimarkigas, ke, kiam mi eldiras mian opinion, la partero ne kuraĝas kontraŭdiri. Mi ja aliras tre akurate; kaj kiam promesite al iu poeto, mi ĉiam krias: „Jen estas io bela!" antaŭ la eklumigo de la kandeloj.

Magdelon — Nedubeble! Admirinda loko, Parizo; tie ĉi okazas ĉiutage cent aferoj, nesciataj en la provincoj, kiel ajn sprita oni estas.

Cathos — Sufiĉas; ĉar vi avertis nin, ni plenumos nian devon, kriante konvene pri ĉio, kion oni diros.

Mascarille — Mi ne scias, ĉu mi eraras, sed vi aspektas kvazaŭ vi verkis iun komedion.

Magdelon — He! Tio povas esti iom vera, kion vi suspektas.

Mascarille — Ha! Necesas, ja, ke ni vidu ĝin. Inter ni dirite, mi verkis unu, kiun mi deziras ludigi.

Cathos — Ha! Al kiuj aktoroj vi komisios ĝin?

Mascarille — Kia demando! Al la famaj komediistoj.[20]) Nur ili kapablas arte ludi; la aliaj estas malkleruloj, kiuj recitas kiel oni parolas; ili ne scias emfazi la versojn, kaj halti ĉe la bela loko; kaj kiun rimedon distingi la belan verson, se la aktoro ne haltas kaj avertas vin, ke necesas aplaŭdi.

Cathos — Efektive, ekzistas maniero rimarkigi al la aŭdantaro, la belaĵojn de verkaĵo; kaj la valoron pliigas tiu maniero.

Mascarille — Kiel vi ŝatas mian plumaron? [21]) Ĉu, laŭ vi, ĝi kongruas kun la vesto?

Cathos — Plene.

Mascarille — La rubando estas bone elektita.

Magdelon — Furioze bone. Tute Perdriĵon-devena.[22])

Mascarille — Kion vi pensas pri miaj krurpuntoj?[23])

Magdelon — Ili aspektas tre bele.

Mascarille — Mi povas glori, ke ili estas pli altaj ol kutime, je granda kvarono da ulno.

Magdelon — Konfesende, ke, neniam antaŭe, mi vidis ĝis tiel alta grado, la elegantecon de la vestaro.

Mascarille — Almetu do, al tiuj gantoj, la pripenson de via flarsento.

Magdelon — Ili odoras terure bone.

[20]) La komediistoj de la „Hotel de Bourgogne" (otel d-burgonj), plej fama teatro tiutempa en Parizo. Molière videble intencas moki la aliajn komediistojn.

[21]) Oni difinis tiel la rubandojn, ŝtrumpetojn, ĉapelon kaj gantojn kaj ĉiujn objektojn, kiuj konsistigis la ornamaĵon de iu kostumo.

[22]) Perdriĵon estas la nomo de la laŭmoda rubandvendisto.

[23]) La altranguloj ornamis siajn ŝtrumpetojn per multe da rubandoj kaj puntoj.

Cathos — Mi neniam enspiris pli bonkondiĉan odoron.

Mascarille — Kaj tiu? *(Li flarigas la pudritajn harojn de sia peruko.)*

Magdelon — Ĝi estas altkvalita; mia cerbo estas delikate tuŝita.

Mascarille — Vi nenion diras pri miaj plumoj; kiel vi ŝatas ilin?

Cathos — Terure belaj.

Mascarille — Ĉu vi scias, ke ĉiu kostas unu luidoron? Mi kutimas surporti ĉion plej belan.

Magdelon — Mi certigas al vi, ke vi kaj mi havas simpation unu por la alia; mi estas furioze postulema rilate ĉion, kion mi surportas; kaj eĉ pri miaj ŝtrumpoj mi nenion toleras, krom de la belmoda kudristino.

Mascarille (subite ekkriante) — Oj, oj, oj, milde! Dio damnu min, sinjorinoj, tre malbone vi kondutas; mi plendas pri via agmaniero; tio estas neĝentila.

Cathos — Kio estas do, kio estas al vi?

Mascarille — Kio? Ambaŭ vi kontraŭ mia koro samtempe? Min ataki dekstre kaj maldekstre! Ha! Tio estas kontraŭ la komuna leĝo; la batalo ne estas egala kaj mi volas krii: murdon!

Cathos — Ni konfesu, ke li diras ĉion laŭ tute speciala maniero.

Magdelon — Li havas admirindan spritsintenon.

Cathos — Al vi estas pli da timo ol da vundoj, kaj via koro krias antaŭ la atako.

Mascarille — Kion diable? Ĝi estas vundita de kapo ĝis piedoj.

SCENO X

Marotte — Sinjorino, iu deziras viziti vin.

Magdelon — Kiu?

Marotte — Vicgrafo de Jodelet.

Mascarille — Vicgrafo de Jodelet?

Marotte — Jes, sinjoro.

Cathos — Ĉu vi konas lin?

Mascarille — Li estas mia plej korintima amiko.

Magdelon — Rapide enirigu.

Mascarille — Jam antaŭ kelke da tempo ni ne renkontis unu la alian kaj mi estas ravita de tiu hazardo.

Cathos — Jen li venas.

SCENO XI

Mascarille — Ha! Vicgrafo!

Jodelet — Ha! Markizo!
(Kisante unu la alian.)

Mascarille — Kiel feliĉa renkonti vin tie ĉi!

Jodelet — Kiel ĝojega vidi vin tie ĉi!

Mascarille — Kisadu ankoraŭ iome, mi petas.

Magdelon — Kara mia, nia famo ekdisvastiĝas; jen nun la sprita mondo komencas viziti nin.

Mascarille — Sinjorinoj, favore konsentu, ke mi prezentu al vi ĉi tiun nobelon; je mia honorvorto, li estas inda esti konata de vi.

Jodelet — Estas juste veni honori vin, kiel decas, kaj viaj ĉarmoj postulas siajn noblajn impostojn super ĉiaj specoj de personoj.

Magdelon — Vi portas viajn ĝentilaĵojn ĝis la plej foraj limoj de flatado.

Cathos — Tiun ĉi tagon ni devos indiki sur nia almanako kiel tagon de feliĉo.

Magdelon (al Almanzor) — Nu, knabo, ĉu mi ripetos la samon? Ĉu vi ne vidas, ke necesas unu plia seĝego?

Mascarille — Ne miru vidi la vicgrafon, kia li estas; li nur eliĝas el malsano, kiu paligis lian vizaĝon, kiel vi vidas.

Jodelet — Fruktoj de maldormo ĉe la Kortego kaj de suferoj ĉe la milito.

Mascarille — Ĉu vi scias, sinjorinoj, ke en la vicgrafa persono vi vidas unu el la plej bravaj viroj el tiu ĉi jarcento? Li estas trihara bravulo.[24])

Jodelet — Vi ne bezonas envii min, Markizo; kaj ni scias, kion vi ankaŭ povas plenumi.

Mascarille — Estas vere, ke ni vidis ambaŭ nin ĉe la faro.

Jodelet — Kaj en lokoj, kie estis varmege.

Mascarille (rigardante ambaŭ sinjorinojn) — Jes, sed ne tiom, kiom ĉi tie. Ej! Ej! Ej!

Jodelet — Ni interkonatiĝis ĉe la armeo; kaj la unuan fojon, kiam ni renkontis unu la alian, li estris rajdregimenton sur la Maltaj remŝipoj.[18])

Mascarille — Vere; sed tamen, vi jam troviĝis en tiu ofico, antaŭ ol mi alvenis; kaj mi memoras, ke mi estis ankoraŭ nur suba oficiro, kiam vi estris jam dumil ĉevalojn.

Jodelet — Bela afero estas milito; sed, verdire, la Kor-

[24]) Komparo kun la altkvalita veluro, kiun uzis la nobeloj; ekzistis veluroj de du kaj tri fadenoj.

tego rekompencas tre maldece siajn servintojn, kiel ni.

Mascarille — Pro tio mi intencas pendigi la spadon ĉe la hoko.

Cathos — Koncerne min, mi havas furiozan korinklinon al la spadservantoj.

Magdelon — Ankaŭ mi amas ilin; sed mi postulas, ke spriteco spicu bravecon.

Mascarille — Ĉu vi memoras, Vicgrafo, pri tiu duon-luno[25]), kiun ni venkakiris de la malamikoj, dum la sieĝo apud Arras?[26])

Jodelet — Kion vi volas diri per tiu duon-luno? Estis ja tuta plenluno.

Mascarille — Mi opinias, ke vi pravas.

Jodelet — Mi memoras ĝin, per Dio. Tie mi vundiĝis ĉekrure per grenado, kies postsignoj estas ankoraŭ videblaj. Iom palpu, mi petas; vi sentos iun frap-signon, tio estis tie.

Cathos (tuŝinte la lokon) — Vere, granda estas la cikatro.

Mascarille — Donu vian manon kaj palpu tiun ĉi, ekzakte ĉe la postaĵo de la kapo; ĉu vi trovas?

Magdelon — Jes, mi iom sentas.

Mascarille — Ĝi estas muskedpafo, dum mia lasta militiro.

Jodelet (malkovrante sian bruston) — Jen alia, kiu boris min trae, ĉe la atako de Gravelines.[27])

[25]) Duon-luno estas fortika konstruaĵo formanta akutan angulon, kies interna parto desegnis lunarkan formon.
[26]) En 1640, kiu igis la francojn posedi tiun urbon.
[27]) Batalo okazinta en 1658.

Mascarille (metante sian manon sur la butonon de sia kuloto) — Mi volas vidigi al vi furiozan vundon.

Magdelon — Ne necesas; ni kredas senkontrole.

Mascarille — Ili estas honorigaj postsignoj, kiuj montras nian valoron.

Cathos — Ni neniel dubas pri viaj kvalitoj.

Mascarille — Vicgrafo, ĉu vi havas vian karoson?
Jodelet — Kial?

Mascarille — Ni kunprenus tiujn damojn eksterurben kaj proponus monduman manĝon.

Magdelon — Ni ne konsentus eliri hodiaŭ.

Mascarille — Ni do venigu violonistojn, por danci.

Jodelet — Certe, bona konsilo!

Magdelon — Pri tio ni konsentas; sed necesas pliigi la kunestantojn.

Mascarille — Hola! Champagne, Picard, Bourguignon, Cascaret, Basque, la Verdure, Lorrain, Provençal, la Violette.[28]) Al infero ĉiujn lakeojn. Mi opinias, ke, en Franclando, oni ne povus trovi nobelon tiel malbone servatan, kiel mi. Tiuj kanajloj ĉiam lasas min sola.

Magdelon — Almanzor, diru al la servistaro de tiu sinjoro, ke ili venigu violonistojn kaj invitu tiujn apudajn sinjorojn kaj sinjorinojn por konsistigi la dancantaron nian.

Mascarille — Vicgrafo, kion vi opinias pri tiuj okuloj?

Jodelet — Sed al vi mem, Markizo, kiel ili ŝajnas?

[28]) La plimulto el tiuj nomoj devenas de la provinco, kie naskiĝis tiuj lakeoj.

Mascarille — Mi ja diras, ke niaj liberecoj riskas eliri el ĉi tie ne sendomaĝe. Almenaŭ mi ricevas strangajn skuojn kaj mia koro pendas nur per unu fadeno.

Magdelon — Kiel natura estas ĉio, kion li diras. Li esprimas ĉiajn aferojn plej agrable en la mondo.

Cathos — Vere, li faras furiozan[6]) elspezon de sprito.

Mascarille — Por montri al vi, ke mi estas senafekta, mi volas improvizi pri tio ĉi. *(Li meditas.)*

Cathos — He! Mi petegas vin per la plena aliĝo de mia koro; ni almenaŭ aŭskultu ion verkitan por ni.

Jodelet — Mi ŝatus fari samon, sed mi sentas min iom senfortigita pri la poezia kreoforto, pro la nombro da sangellasoj tiurilate faritaj en la pasintaj tagoj.

Mascarille — Diable! Kio estas tio? Mi ĉiam faras bone la unuan verson; sed mi penas por la aliaj. Per Dio, tio estas iom tro hasta, mi improvizos por vi laŭplaĉe, kaj vi tion trovos la plej bela afero en la mondo.

Jodelet — Li estas sprita kiel demono.

Magdelon — Kaj galanta kaj stileleganta.

Mascarille — Vicgrafo, diru do, ĉu de longe vi ne vidis la Grafinon?

Jodelet — De pli ol tri semajnoj mi ne vizitis ŝin.

Mascarille — Ĉu vi scias, ke la Duko venis al mi hodiaŭ matene kaj volis kunpreni min al la kamparo por ĉasi cervojn kun li?

SCENO XII

Magdelon — Dio mia! Karulinoj, ni petas pardonon. Tiuj sinjoroj fantazie deziris havigi al ni la animojn

de la piedoj[29] kaj ni petis vin veni por plenigi la malplenon de nia kunveno.

Lucile — Vi honorigis nin, sendube.

Mascarille — Tio estas nur rapide organizita balo, sed, baldaŭ ni aranĝos unu laŭ la formoj. Ĉu jam alvenis la violonistoj?

Almanzor — Jes, sinjoro, ili ĉeestas.

Cathos — Nu, do, karulinoj, pretiĝu.

Mascarille (dancante sola kvazaŭ prelude) — La, la, la, la, la, la, la, la.

Magdelon — Lia talio estas senriproĉe eleganta.

Cathos — Kaj li aspektas konvena dancisto.

Mascarille (ĉirkaŭbrakante Magdelonon) — Mia libereco dancos la kurantan dancon, tiel bone kiel miaj piedoj. Kadence, violonistoj, kadence. Ho, malkleruloj! Estas neeble danci, kun ili. Forprenu vin la diablo! Ĉu vi ne scias ludi laŭtakte? La, la, la, la, la, la, la, vigle, vilaĝaj violonistoj.

Jodelet (dancante poste) — Hola! Ne tiel rapidigu la kadencon! Mi ĵus resaniĝis.

SCENO XIII

La Grange (kun bastono en la mano) — Ha! Ha! Sentaŭguloj, kion vi faras en tiu loko? De tri horoj ni serĉas vin.

Mascarille (sentante batojn) — Oj, oj, oj! Vi ne diris al mi, ke mi ankaŭ rajtos ricevi batojn.

Jodelet — Oj, oj, oj.

[29]) Precioza parolturno por violonoj.

La Grange — Vi senhonorulo, kiel vi kuraĝas ludi rolon de nobelo!

Du Croisy — Tia afero konigos vin al vi mem. *(Ili eliras.)*

SCENO XIV

Magdelon — Kion do signifas tio ĉi?

Jodelet — Estas nur veto.

Cathos — Kio! Toleri tiajn batojn!

Mascarille — Nu, mi preferis ne defendi min, ĉar mi estas malmodera, mi estus flamiĝinta.

Magdelon — Toleri tian honton en nia ĉeesto!

Mascarille — Ne gravas! Ni daŭrigu; ni konas nin reciproke de longe kaj inter amikoj oni ne malamikiĝas pro tiaj bagateloj.

SCENO XV

La Grange — Per Dio, friponoj, vi ne priridos nin, mi promesas. Vi, eniru. *(Tri-kvar glavistaĉoj eniras.)*

Magdelon — Kia aŭdaco estas tio, veni kaj tiel ĝeni nin en nia hejmo.

Du Croisy — Sinjorinoj, kiel ni povus toleri, ke vi ricevas niajn lakeojn pli dece ol nin mem? Ke ili amindumas vin je nia domaĝo kaj donas al vi balon?

Magdelon — Viaj lakeoj?

La Grange — Jes, niaj lakeoj; kaj tio estas nek bela, nek honesta diboĉigi ilin tiel.

Magdelon — Ho ĉielo! Kia ofendo!

La Grange — Sed ili ne vante uzos niajn vestojn por plaĉi al vi; kaj se vi intencas ami ilin, tio estos, pro ilia persono. Rapide, senvestigu ilin tuj.

Jodelet — Adiaŭ, nia eleganteco!

Mascarille — Jen, tere, markizato kaj vicgrafato!

Du Croisy — Ha, ha! Kanajloj, vi aŭdacas ĉasi sur niaj bienoj! Vi havigos al vi aliloke la necesaĵojn por plaĉi al la okuloj de viaj amatinoj, tion mi certigas.

La Grange — Estas troe nin anstataŭi, kaj plie, kun niaj vestoj.

Mascarille — Ho Fortuno, kiel ŝanĝema ci estas!

Du Croisy — Rapide, forprenu de ili la plej etan objekton.

La Grange — Forportu ĉiujn ĉi vestaĉojn, rapidu. Nun, sinjorinoj, kun ili en tiu stato, vi povos daŭrigi vian amindumadon, tiel longe kiel plaĉos al vi; ni lasas vin tute liberaj por tio kaj promesas, sinjoro kaj mi, ke ni neniel ĵaluzos pro tio.

Cathos — Kia konfuzo!

Magdelon — Mi mortos pro kolero.

Violonistoj (al la markizo) — Kion signifas tio? Kiu pagos nin?

Mascarille — Petu sinjoron Vicgrafon.

Violonistoj (al vicgrafo) — Kiu donos monon al ni?

Jodelet — Petu sinjoron Markizon.

SCENO XVI

Gorgibus — Ha! Vi, fiulinoj, vi metas nin en belan aferon, laŭ tio, kion mi komprenas! Kaj mi ekscias pri belaj aferoj, laŭ tiuj elirantaj sinjoroj.

Magdelon — Ha! Patro, ili faris kruelan farson al ni.

Gorgibus — Jes, kruela farso, sed kaŭzita de via stulteco, hontulinoj! Ili venĝis sin pro via akcepto al ili kaj tamen mi, malfeliĉulo, devas elporti tiun honton.

Magdelon — Ha, mi ĵuras, ke ni venĝos nin, aŭ mi mortos pro ĉagreno. Kaj vi, malnobluloj, kiel vi kuraĝas stari antaŭ ni, post tia ofendo.

Mascarille — Tiel trakti Markizon! Tia estas la mondo! La plej eta senfavoriĝo igas, ke niaj iamaj adorantoj nin malŝatas. Ni foriru, kunulo, iru aliloken kaj serĉu feliĉon; tie ĉi nur la vantan ŝajnigon oni ŝatas kaj la nudan meriton ne estimas. *(Ili ambaŭ eliras.)*

SCENO XVII

Violonistoj — Sinjoro, ni postulas, ke vi kontentigu nin, anstataŭ ili, pro la muziko kiun ni faris.

Gorgibus (batante ilin) — Jes, jes, mi tuj kontentigos vin, per tiu mono mi pagos vin. Kaj vi, pendindulinoj, mi forte deziregas fari same al vi. Oni priridos kaj mokos nin, kaj tiun ĉi rezultaton vi atingis per viaj ekstravagancoj. Iru for en kaŝejon, malbelulinoj, kaŝu vin por ĉiam. Kaj vi, kaŭzoj de ilia frenezo, stultaĵoj, malprudentaj distroj de senokupaj spiritoj, romanoj, versoj, kanzonoj, sonetoj kaj sonoriloj, se nur vi povu iri al ĉiuj diabloj!!!

Listo de vortoj
netroveblaj en la 4a eldono de la plena vortaro

ATO — (en „markizato", „vicgrafato") Internacia sufikso lastatempe uzita en la gazetaro (profesorato, lektorato, sekretariato) kun la signifo de ofico, kariero, rango k.t.p.

DELICO — Delikata ĝuo.

KAROSO — Luksa ĉevalveturilo el la nobela tempo, tegmenthava kaj muntita sur kvar radoj (France: *carrosse* — itale *carrozza).* Ĝi estis ĝenerale trenata de ĉevaloj duope jungitaj.

PRECIOZA — Afekta, pedanta — Pli ekzakte, tiu adjektivo karakterizas tro afektajn manierojn en la penso kaj lingvaĵo, kiujn oni sporade trovas tra ĉiuj jarcentoj en plej diversaj landoj. La grekaj poetoj el la Aleksandria periodo estis preciozuloj. En Romo, Seneko, kvankam li mem tiel pekis, plendas, ke la eleganteco tro montriĝas per abundo kaj aŭdaco de metaforoj. En Francujo, la „Romano de la Rozo" en al XIII-a jarcento, estis la unua manifestiĝo de preciozeco. Frue de la XVI-a jarcento kaj komence de la XVII-a, preciozeco nomiĝas en Anglujo „Eŭfuismo" (laŭ la titolo de John Lyly: Eŭfues aŭ la anatomio de la Spirito", 1579). Same, ĝi estas konata en Hispanujo sub la nomo „stilo culto" aŭ „gongorismo" (laŭ la nomo de la poeto Luis Gongora) kaj en Italujo sub la nomo „Marinismo" (pro la poeto Marini). Same en la unuaj jaroj de la XVII-a jarcento, la preciozeco instaliĝis en Francujo.(Préciosité).

Ŝajne, por tia ĉiam renaskiĝanta nocio, la internacia lingvo bezonas apartan terminon: ni proponas la formon „precioza" el la samsignifa franca „précieux" (latine: „pretiosus"), kies unua signifo estas: grandvalora.